



KARAJ LEGANTOJ

Jen denove la lasta kajero de ĉi tiu jarkolekto de nia revuo. Koran dankon al ĉiuj, kiuj pli malpli regule ensendis artikolojn kaj sciigojn, konsilojn kaj aprobojn; certe envenis ankaŭ kritiko pri la enhavo, sed vere estas neeble, kontentigi ĉiujn, ĉar rubriko kiu estas plej bonvena al unu, tute ne estas interesa por alia leganto! Kelkaj deziras tre riĉe ilustritan revuon, aliaj pli ŝatas havi legaĵon kaj por tio volonte sakrifikus ĉiujn fotojn! Ŝajnas al mi plej bone, promeni laŭ la meza vojo kaj klopodi, almenaŭ kontentigi kiel eble plej multajn legantojn, elektante por ĉiu kajero plej variajn artikolojn. Cetere la fotokliŝoj estas tre multekostaj: por ĉiu kliŝo mi pagas almenaŭ la prezon de du jarkotizoj kaj bedaŭrinde mi devas timi deficieton pri ĉi tiu jaro pro la fakto, ke ĝis nun 125 membroj ne pagis sian kotizon por 1961 kaj diversaj eĉ ne por 1960. Tio ne povas daŭrigi kaj tial nun multaj legantoj trovos en ĉi tiu kajero sciigon, ke ili ne plu ricevos la revuon ĝis ili estos pagintaj la ŝuldon, kvankam mi timas ke ni definitive perdos ilin! Espereble niaj fidelaj, fervoraj membroj faros sian eblon, gajni novajn membrojn por anstataŭi la forrestintojn!

Mi volas peti mallongan preĝon al vi ĉiuj por mia patrino, kiu dum jaroj fidele helpis min en miaj taskoj kaj ĝis antaŭ kelkaj monatoj, kiam ŝia sanstato tion ne plu permesis, ĉiumonate ekspedis nian revuon kaj eĉ dum sia malsano, antaŭ la transporto al la hospitalo, plurfoje forlasis la liton kaj trenis sin al la pordo se la leterportisto ne povis deponi kelkajn aferojn en la leterkeston. En ĉi tiu monato ŝi esperas atingi sian 80an naskiĝtagon, kaj mi esperas, ke ankaŭ viaj preĝoj kontribuos por ke ŝi povos festi tiun tagon hejme, ĉirkaŭata de sia multnombra familio!

Restas al mi deziri al vi ĉiuj, ankaŭ en la nomo de la tuta estraro de IKUE, gracoplenan, ĝojan Kristnaskon!

Truus Durenkamp

Registritaj leteroj, pakajoj, kaj ĝenerale ĉiuj poŝtaĵoj tro grandaj por la fendo de ordinara poŝtkesto, destinitaj al Redakcio aŭ Administracio, t.e. Centra Oficejo en Dordrecht, estu adresataj jene: F-ino T. Durenkamp, Heemraads-singel 147, Rotterdam-6, Nederlando.



LKK-sekretariino :
 F-ino Elena Cipriani,
 Via R. Bonghi 34
 ROMO — Italujo.

SESA BULTENO

★ ★

Dum ni aperigas nian sesan Bultenon, diversaj aferoj koncerne la preparon de nia Kongreso samtempe antaŭen marŝas. Ni estigis la unuajn kontaktojn kun religiaj kaj ŝtataj eminentuloj, por havigi al nia 29a ilian konsenton kaj eventuale helpadon; ni prizorgas apartajn presadojn,

inter kiuj precipe gravan esperantan prospekton de nia Urbo kaj serion de 12 belegaj koloraj bildkartoj. Unu el ĉi tiuj estas speciale presita laŭ fotokolora sistemo. Ne mankos ankaŭ kelkaj glumarkoj. Dum multaj ankoraŭ sin anoncas, kvankam ili aliĝos nur poste, al la jam aliĝintoj estis en speciala registro asignata la ĉambro en la kongresejo. Ni ne forgesos aranĝi por la ĝojo de niaj kongresanoj, allogan vesperfeston kun artaj ludoj. La junulara sekcio siaflanke laboras. Ĉifoje ni transdonos programon de eskurso planita de niaj junuloj por ili kaj por ĉiuj, kiuj volas kune kun ili ĝui tagon plenan de diversaj, ĉiam ĝojigaj travivaĵoj:

„Se oni dirus al la bonvenaj junaj gastoj de la 29a kongreso de I.K.U.E., ke iliaj romaj samaĝanoj elpensis sistemon por igi ilin salti, en nur unu tago, de jarcento en jarcenton, ili tute certe konsiderus siajn amikojn el Romo nekuraceble fanfaronaj kaj eĉ freneziĝantaj. La fakto tamen estas, ke oni planis por la junula ekskurso la viziton kaj de la mirindaj etruskaj tomboj en *Tarquini*a, kaj de la inspirigaj mezepokaj urboj, *Viterbo* kaj *Tuscania*, kaj finfine de unikaj barokaj kuriozaĵoj, tio estas la parko de la ŝtonaj gigantoj en *Bomarzo*.

Tiel ampleksa programo postulos, kiel oni diris, nur unu tutan tagon de la 5,30 frumatene ĝis la deka horo nokte, ĉar oni veturos per aŭtobuso 334 kilometrojn. Sorĉe belaj maraj, montaj kaj lagaj pejzaĝoj estos traveturataj kaj oni havos la tute privilegian eblecon, gusti la faman vinon *EST-EST-EST*, haltinte en *Montefiascone* (itallingve: monto de la granda vinbotelo). En la lago *Bolsena* oni banos kaj luos boatojn. Por la ekskursita tago oni ankoraŭ ne fiksas daton; ĝi tamen okazos aŭ jaŭdon 16.8., aŭ sabaton la 18-an, aŭ lundon la 20-an, kondiĉe ke ne okazos alia ekskurso la antaŭan aŭ la postan tagon.

<i>Rocca di Papa</i> : forveturo	5.30 h.	<i>Capo di Monte</i> : tagmanĝo	13.00 h.
<i>Viterbo</i> : kafo	8.00 h.	<i>Tuscania</i>	15.55 h.
<i>Bomarzo</i>	9.15 h.	vespermanĝo	
<i>Montefiascone</i> : vino	11.50 h.	<i>Tarquini</i> a	17.30 h.
		<i>Rocca di Papa</i>	22.00 h.

LA EKLEZIO EN LA MONDO

LA KONCILO EN LA MONDO

Papo Johano XXIII konstatis, ke ekzistas kreskanta intereso por religiaj aferoj.

En la komenco de novembro la Sankta Patro malfermis la duan kunvenon de la centra komisiono preparanta la Vatikanan Koncilon kun prelego, en kiu li konstatis, ke la mondo ekmoviĝas al drama situacio. Li ripetis siajn vortojn de la deka de septembro: „Ni urĝe petas la registarojn bone konscii sian timigan respondecon.” La laboro de la venonta koncilo celas nepre kontribui por krei atmosferon de fido, espero kaj kunlaboro en la mondo. Dum oni eble pensas, ke la atento en la mondo tute estas turnita al la ekonomiaj kaj politikaj problemoj, montriĝas, ke la intereso speciale por moralaj kaj religiaj problemoj pli kreskas ol malkreskas. Tion atestas la intereso por la venonta koncilo en kaj ekster la Eklezio. Oni atendas, ke la Papo je Kristnasko solene anoncos la koncilon kaj faros siajn invitojn por partopreni aŭ ĉeesti ĝin.

La unuan fojon en la historio la venonta koncilo estos

KONCILO DE ĈIUJ POPOLOJ.

Komparante kiuj partoprenis la Vatikanan Koncilon en 1869-1870, kaj kiuj nun estas invitataj por la venonta koncilo, oni vidas grandan diferencon koncerne la devenan landon de la personoj. De la 1050 invitataj episkopoj pli ol 700 partoprenis la Vatikanan Koncilon en 1869. Inter ili estis neniu episkopo el Azio kaj Afriko escepte kelkaj el la Meza Oriento. La Eklezio en Afriko kaj Azio nur estis reprezentita de kvindek da eŭropaj misiaj episkopoj. Estas evidente, ke tiu koncilo ne havis multan atenton por primisiaj aferoj. Dum la venonta koncilo la Mondeklezio, ankaŭ la Eklezio en Azio kaj Afriko, tute estos reprezentata. La rilatoj estas nun grave ŝanĝintaj. En Eŭropo kaj la ambaŭ Amerikoj loĝas 450 milionoj da katolikoj, kaj en Azio kaj Afriko kune ne malpli ol 50 milionoj. Iom post iom oni retrovas ĉi tiujn novajn rilatojn en la nova kolegio de kardinaloj. En 1960 estis 60 de la 80 kardinaloj ankoraŭ eŭropanoj; 16 estis amerikanoj kaj la ceteraj 9 venis el aliaj mondpartoj. Sed estas pli. La Eklezio estos reprezentata dum la koncilo alimaniere ol la rilatoj en la kolegio de kardinaloj atendigas.

Pro la multe pli malgranda denseco de la katolikaj grupiĝoj en Azio kaj Afriko, kie estas laŭ la nombro de katolikoj laŭproporcie multaj diocezoj, la nombro de la episkopoj en Azio kaj Afriko estas tre alta. Oni nun atendas, ke la nombro da partoprenantoj en la venonta koncilo estos proks. 2800: kardinaloj, (ĉef)-episkopoj, ĝeneralaj estroj de ordenoj kaj kongregacioj, kaj specialistoj. Nu: Eŭropo havas 47% de ĉiuj katolikoj kaj 38% de la partoprenantoj de la koncilo. La ambaŭ Amerikoj nombras 43% de ĉiuj katolikoj kaj liveros preskaŭ 10% de la partoprenantoj. En Azio-Oceanio loĝas 7% de ĉiuj katolikoj kaj ĝi liveros 20,5% de la konciliaj partoprenantoj. El Afriko kun 3% de ĉiuj katolikoj, venos 10% de la partoprenantoj. La reprezentantoj el la afrikaj kaj aziaj katolikoj ne estos kiel en 1869 nur eŭropaj episkopoj. Ne malpli ol 120 denaskaj aziaj kaj preskaŭ 60 denaskaj afrikaj episkopoj estas invitataj por la koncilo. Papo Johano volas fari vere renovigan koncilon. En kiun direkton tiu renovigo iros? Pasis multaj jarcentoj de okcidenteŭropa supereco, de okcidenta memcerteco en la Eklezio. Eŭropo juĝis pri la tuta mondo. Kiu vidas tra la nombroj kaj la

rilatoj ĉi supre menciitaj, komprenos ke dum la venonta koncilo la eŭropa solparolado estos pasinta tempo. La problemoj de la koncilo necese estos veraj mondekleziaj problemoj, aŭ ili almenaŭ estos influotaj de mondaj aspektoj. Katolikoj el la tuta mondo kune pri tio parolos. La venonta koncilo estos koncilo de la Eklezio inter la popoloj; por la unua fojo en ĝia historio!

LA EKLEZIO KAJ LA LABORISTOJ

La Katolika Laborista Junularo montras grandan entuziasmon por „Mater et Magistra” dum la 2-a Mondkonsilantaro en Petropolis (Brazilo), novembro 1961.

Ĉar miloj da katolikaj laboristaj gejunuloj en Eŭropo libervole per horpaga akcio kolektis monon, por ke junaj homoj el la aziaj kaj afrikaj landoj povu iri al Brazilo, estis eble, ke 350 reprezentantoj el 90 diversaj landoj ĉeestis la 2-an Mondkonsilantaron en Brazilo.

La kongreso komencis en dolorigaj cirkonstancoj, ĉar flugmaŝino kun partoprenontoj pereis dum interalteriĝo en *Recife (Pernambuko)*. Estis multaj mortintoj kaj grave vunditoj. Krom tio kelkajn tagojn antaŭ la kongreso la prezidanto de la Katolika Laborista Junularo en Kubo estis fusilita sub la reĝimo de *Castro*. Dum la malferma kunsido parolis la belga *Msro Cardijn*, fondinto de la movado; li estis kore aplaŭdata de la junaj ĉeestantoj el ĉiuj partoj de la mondo. Eble ne ĉiu ŝatis la retorikon de kelkaj parolantoj, sed certe ĉiu povas admiri la grandan aktivecon de la entuziasmaj kongresanoj. Oni okupis sin dum tiu ĉi mondkonsilantaro grandparte pri bazaj problemoj kiel: la preparado por la edziĝo en ĉiuj landoj de la mondo, la serĉado al adaptata kateĥizo por ĉiuj laboristoj, ĝusta priskribo de la loko de la laboro en la vivo de la junularo, la soliĝo en la hodiaŭa mondo, la reciproka helpdonado ktp.

Oni elektis Brazilon kiel kunvenlandon por pruvi, ke en la kristanaj landoj — malrapide kaj certe — la okuloj estas malfermiĝantaj por la mizeroj de mondparto, kie baldaŭ, almenaŭ en ciferoj, loĝos la duono de la kristanaro. En Sud-Ameriko la encikliko „*Mater et Magistra*” estas multe priparolata temo pro ĝies granda atento por la terkulturo. Ĝi revivigas ĉe multaj la esperon, ke nun ankaŭ la landposedantaj eparkioj elparolos sin rekte por drasta terkultura reformo. Ĉar ankoraŭ la Eklezio tie estas potenco kaj ankoraŭ oni eble povas transpontigi la fendegon inter malriĉuloj kaj riĉuloj sen la forto de la revolucio. Sed kiu vidis bildon de la abomena interna migrado, kaj kiu penetris en la kontraŭ la montoj pendantajn „*favelha*”jn, rimarkante kiel la homoj tie devas vivi, demandis sin eĉ, kial la Eklezio, kiu devas esti la gardanto de ĉiu vivo, ne multe antaŭe elparolis sin...




—varbu—novan—membron!—

IV-a Internacia Kongreso de Kripo-Amikoj.

Certe estas interese por la legantoj de „Espero Katolika”, ke tia asocio ekzistas, ĉar ĝenerale oni nenion aŭdas pri ĉi tiuj amikoj de la kripo. La Munkenaj kripo-amikoj organizis dutagan kunvenon ligitan kun grandioza ekspozicio de kripoj ĉiuspecaj laŭ stilo, landoj kaj eĉ provincoj. Tio kvazaŭ estis la kadro de kunvenoj kaj la unika ligilo. Mi ne volas larĝe raporti pri ĉio, sed por mi kiel esperantisto ĉio estis tre interesa rilate al la lingva parto de la kongreso. Mankis la lingva interkomprenigilo. Partoprenis krome germanoj, italoj, hispanoj, francoj, angloj. Kaj, por ne perdi tro da tempo pro interpretado, oni tradukis la paroladojn antaŭe kaj multobligis ilin, por ke la alilingvaj partoprenantoj havu imagon, kion diris la eksterlandanoj. Por la eksterlandanoj oni interpretis mallongigite. Tamen, la entuziasmo estis granda, kaj kortuŝa estis la parolado de protestanta krip-amikino el Berlino, kiu transdonis la salutojn de samlandanoj en la orienta zono de Germanujo. La emocio estis tiel plena, ke je la fino de ŝia parolado ĉiuj partoprenantoj leviĝis kaj kune laŭtpreĝis Patro-nian por la orientanoj. Estis granda familio, tiuj kripo-amikoj kunvenintaj en Munkeno, kaj la salutado estis vigla, amika kaj delikata, ĉar ĉiuj ja laboras pro la gloro de Jesuo Kristo, kiu naskiĝis en stalo kaj kuŝis en stal-manĝujo. Kaj ĉiujare ili kunvenas en Germanujo kaj ekspozas kripojn. Ĉar ĉiu vera kripo-amiko konstruas ĉiujare novan por rememorigi pri la modesteco de nia Savanto. En 1962 okazos jarkunveno germana en Fulda. Por la V-a internacia kongreso en 1964 oni elektis la urbon Salzburg.

*Ludwig Goppel,
Regensburg, Germanujo.*

*Kripo en tipa
orientbavara pejzaĝo*



UNU KRISTNASKNOKTO.

Oni ne povas diri, ke li estis feliĉa en tiuj tagoj, Vere, eĉ neniu demandis lin, ĉu li estas feliĉa? Li vivis en la interno de Ĉinujo. Liaj samcelanoj malproksime loĝis de li. Unu tutan tagon li bezonus por veturi al ili, sed li ne povis formoviĝi de sia hejmo. En ĉiu momento oni povas voki lin por bapto, lasta unkcio, enterigo. Lia loko estas apud la feliĉo kaj doloroj de aliuloj. Li ne rajtas havi propran ĝojon. Sed li ne povus foriri, ĉar ankaŭ laca li estas. Antaŭ nelonge li revenis de unumonata rondvizitado. En ĉiu vilaĝo, kie vivas kristanoj, li pasigis kelkajn tagojn, loĝinte en la kapeletoj aŭ en la domoj de siaj kredantoj. Malvarminte kaj malsatinte en la 15-gradaj malvarmoj, vane li eniĝis vestita en la dormosakon. Li vivtenis sin per cerealsupoj kaj frostiĝinta brasiko. Li ne razadis sin dum la malvarmo. Lia barbo kreskis. Lia spiro faris blankan nebulon en la glacimalvarmaj kabanetoj, kie li pasigis siajn noktojn. Kiam vespere li ekkuŝiĝis, ne venis dormo sur la okulojn kaj li nur rigardadis la malvarme-brilajn stelojn de la frosta ĉielo. Duonfrote, malgrasiĝinte, nelavite li revenis al sia misia kolonieto, sed ne multe konsolis lin la ĝojo de lia bona laboro. Restis multaj, amaraj memoroj. Malfacile li sukcesis kun sia fortropa, ĉina popolo. La brilo de la kristana kredo nur de malproksime vibretis al ili. Ju pli longe li laboris inter ili, des pli terurigis lin ilia indiferenteco. Troviĝis bonaj kristanoj, sed tiuj estis jam el la dua-tria generacio. Kiujn li baptis tiuj estas ankoraŭ infanoj aŭ se eĉ plenkreskuloj, nesciaj kaj ŝanceliĝemaj. Sankta Kristnasko proksimiĝis. Antaŭ la festoj li jam ne povis foriri de hejme. Li tamen devos skui sin el la obtuza laceco, provi rideti, kiam liaj kredantoj serĉas lin en la sanktaj tagoj por aŭskulti meson, konfesi, peti de li kuracilon kaj kuraĝigon. Dum la sankta meso li preĝis sian psalmon kaj poste eltrinkinte la hordeosupon ne sciis, kion li ekfaru. La horloĝo montris la okan. Kion fari ĝis meznokto? Antaŭe li tre ŝatis la vesperojn kaj la silentajn noktojn, kiam li povis resti sola kun siaj pensoj. Nuntempe li estis laca, eĉ ankaŭ por la spirita vivo. Por havi forton ankaŭ por la morgaŭo, li preferis surlitiĝi kaj ripozi, sed ne povis dormi. Revenis en lian memoron la infanaĝaj, malnovaj, pasintaj kristnaskoj... la varma familia nesto, kristnaskarbo, betlehemaj kantoj... Li ekfrosttremis eĉ sub la dika lankovrilo, surmetis ankaŭ alian, sed tamen ne povis varmiĝi. Li sin devigis regi sin, preĝi. Finfine ne tio estas grava, ke nia vivo estu bonhumore-agrabla, sed tio, ke ni faru nian devon honeste — li pensis. Sed liajn pensojn ne akompanis anima trankviliĝo. Li forjetis de si la kovrilojn kaj eliris al la korto. La malvarma vento enmordis liajn ostojn kaj polvon ĵetis en la vizaĝon. Li malfermis la pordegon kaj ekiris la kurbiĝantan straton. En la malakra, malvarma brilo de la luno tremante kaŭris la vicoj de la vilaĝaj dometoj. Nenie signo de la vivo. Netolereblan solecon li sentis. Se almenaŭ unu sola vivanta estajo estus videbla, unu frata vorto aŭdebla! Sed la vilaĝo dormis. Kiam li enrigardis la kavajn pord-enirejojn de la paganaj domoj, nur la mokaj ridetoj de la argilaj fetiĉoj salutis lin. Por ne vekti atenton per sia nokta vagado, li reiris al sia preĝejo. Nigraj ombroj moviĝis ĉirkaŭ la preĝeja pordo. Liaj kredantoj — ope — nemulte, kolektiĝis. Li ekbruligis la oleomeĉojn kaj sidiĝis en la konfesejo. Poste li ekflamigis du kandelojn kaj celebris la noktomezan meson. La pateno kaj kaliko kvazaŭ pecoj de glacio. Liaj fingroj bluiĝis de la malvarmo. Jam li eĉ ne sentis, ke li tenas ion. La kredantoj foriris, la kandeloj estingiĝis. Li pli proksimen tiris sian genuapogilon al la altaro. Preĝis. Honeste, volonte, kviete, lace. Ĉion li faris, kion li kapablis per

sia homa forto. Sed tamen ne povis sufiĉe forte batali kontraŭ la dormo. Li ekdormis dum sia dankdiro, sur la apogilon kliniĝante, profunde ekdormis. Sed lia cerbo pluen funkciis. Jam ankaŭ alifoje okazis, ke dum lia matena meditado, kiam li tre laca estis, subpremis lin la dormo, kaj tiam li tamen pluen meditadis. Sed la meditado tiam estis pli trankvila, pli paca kaj pli kolorplena. Ĉu eble lia vigla fantazio laboris tiam liberiĝinte? Lia vivo estis fermita inter grizaj kadroj, lia laboro senĉese lin okupis, lia fantazio katenite dormetis ie sub lia konscio. Kaj tiam liberiĝintaj, freŝaj bildoj ekriĉigis lian sekiĝantan vivon. Nun, nerimarkinte la limon inter la maldormo kaj sonĝo, li tiel vidas, ke du kredantoj liaj venas en la preĝejon. Li eĉ aŭdas la irfrapetojn de iliaj ŝuoj. Je lia surprizo ili ne haltas malantaŭe, sed antaŭen venas kaj ekstaras apud li. Unu dekstre, alia maldekstre. Li supren rigardas. Unu estas virino, la alia viro. La virino estas tre juna, la viro sunbruniĝinta.

— Malvarme estas hodiaŭ nokte! — ĝemas salute la viro. La virino klinas sian vizaĝon al sia malgranda bebo, kaŝita en dika kovrilo. Poste ankaŭ ŝi rigardas al li kaj kvazaŭ salute diras:

— Ĉu vi malvarmas?

La demando surprizas lin, ĉar la ĉinaj virinoj ne kutimas alparoli la virojn.

— La nokta meso jam finiĝis, matene je la naŭa estos la granda mēso, — li klarigas al ili. — Se vi venis de malproksime kaj vi ne havas konatulojn en la vilaĝo, — li daŭrigas, — tiam venu en mian gastĉambron.

— Kun via permeso ni ĉi tie atendos la matenan meson, — respondas la virino kaj eksidiĝas kun sia edzo sur la unuan benketon.

— Tamen pli bone estos por la virino, se ŝi ripozos en la ĉambro, — li sufloras al la viro. Poste li denove alrigardas ilin kaj al li ŝajnas certe, ke li konas ilin, nur ne povas rememori, el kiu vilaĝo ili estas.

— Se vi volus iom teni la infanon, mi pli volonte restus ĉi tie, — ekparolas la virino. — Nur unu foje estas Kristnasko en la jaro, al mi plaĉas ĉi tie pasigi la nokton. Ŝi forprenas de sia kolo la lanŝalon, envolvas la bebon kaj donas al li. Kiam li transprenas ĝin, strangan baton li sentis tra sia korpo. Li ekkonas la *Infanon*.

— Mia Sinjoro, — li krias ektimiĝinte, — ĉu Vi ne malvarmas? ...En tia frostoj! La Infano ekridetas pro lia balbutado kaj ĉirkaŭbrakas lian kolon.

— Sankta Maria, reprenu vian Infanon, mi ne estas inda, ke mi tenu Lin, — li turnas sin al la virino. Maria tamen ne reprenas la Infanon kaj Sankta Jozefo trankvile kapjesas:

— Nur tenu, Li volas tiel! La Infano ĉirkaŭbrakas lin denove kaj ridetas. Per siaj etaj fingroj Li forviŝas la larmojn sur lia vizaĝo... En tiu momento li vekigis kaj ĉirkaŭrigardas. Lumo brilas en liaj okuloj kaj li ekvidas la ministrantan knabon apud si.

— Patro, jam estas la tempo de la meso, ĉu mi lumigu la kandelojn? Li saltstariĝas kaj sin turnas. Kontraŭ li lia tuta kredantaro. Tricent paroj da okuloj mire rigardas lin, nekomprene, scivole. Kelkaj okuloj ridetas kaj diras: — Kiom homa li estas, la kompatindulo! Li ekdormis dum sia preĝado! Liaj rigidiĝintaj piedoj nur malcerte portas lin al la sakristio. Li klinas sian kapon, sed estas feliĉa...

*László Cser S.J. en „A Sziv” (La Koro), Shrub Oak N.Y. Usono
El hungara lingvo tradukis D-ro J. Hamvai*

La Nova Testamento en Esperanto

En la E.K.-numero de oktobro 1960 ni anoncis nian planon publikigi la Esperantan tradukon de la Nova Testamento en dumonataj aldonoj al E.K. kaj ni promesis eldoni 48 paĝojn ĉiujare. Nun unu jaro pasis kaj ĉiuj abonantoj ricevis la kompletan Enkondukon kaj proks. ok ĉapitrojn de Mt. Kun la sentekstaj kaj titolo-paĝoj tio estas entute 64 paĝoj! Pluraj membroj esprimis sian ĝojon kaj laŭdon pro la iniciato; multaj sendis kun sia abonmono pri E.K. ankaŭ unu guldenon kiel pagon pri la Biblio-aldonoj; multaj aliaj bedaŭrinde ne faris tion! Se kelkaj aliaj ne estus pagintaj multe pli ol unu guldenon, ne estus eble daŭrigi nian eldonadon. Do ni esperas, ke la nepagintoj ankoraŭ sendos sian „aldonon“ kaj se eble samtempe pri 1962! Dum 1962 ni intencas daŭrigi la tradukon de Mt kaj Dio volante ni esperas finfari Mt en 1963. Samtempe ni jam publikigas en Vojo Vero Vivo tradukon de alia parto de la N.T., la Unua Letero de S. Paŭlo al la Korintanoj. Poste la definitivan tekston de tiu traduko ni aperigos per E.K. Jam nun ni povas antaŭvidi, ke la nombro da paĝoj ĉiam kreskos, dum la dato de la kompletigo ankoraŭ ne estas konjektebla. Por eviti amasiĝon de tiuj aldonoj ni proponas kolekti tiujn en dek unu kajerojn:

kajeroj 1-4 : la 4 Evangelioj
kajero 5 : La Agoj de la Apostoloj
kajeroj 6-9 : La Leteroj de S. Paŭlo
kajero 10 : La aliaj Leteroj
kajero 11 : La Apokalipso.

Plej facile oni do povos kolekti la aldonojn tiamaniere post finpretigo de ĉiu parto. Volonte ni petas la intensan kunlaboron de ĉiuj legantoj de E.K.:

1. prelegu parton de la N.T. en viaj klubkunvenoj;
2. primeditu la Vorton de Dio;
3. varbu novajn abonantojn por E.K. por disvastigi la Vorton de Dio per Esperanto: ekzistas ankoraŭ miloj da katolikaj Esperantistoj, kiuj ne abonas nian revuon!

H. G. Wannemakers S.J.

LA HOMO SEN TIMO ANTAŬ LA ESTONTECO.

Studsemajno de katolikaj akademianoj en Tanzenberg.

Pli ol cent universitataj gestudentoj, plej parte de natursciencaj kaj teknikaj fakoj, kunvenis fine de Julio 1961 en studsemajno, kies temo estis la „validanta hombildo“. Ĉi tiu hombildo estas difinebla kiel „homo ludens“ — la ludanta homo, kiu jam de kelka tempo en la verkoj de Huizinga, Hugo Rahner k.a. estis temo de kulturfilozofia kaj teologia pensado.

„Ludanta homo“ ne estu komprenata en la senco de ludema kaj malserioza, sed kiel staranta super la aferoj de ĉi tiu mondo, kiel interna distanciĝo de individuo de la materia paso de la historio, do je interna libereco rilate la hommoviĝon. Sub ĉi tiu aspekto evoluis la referato de Prof. Dro Hansemann, Graz al kristana ekzistanalizo de la amo. Pri la humoro kiel moderna apero de la prakristana „agapo“, tio estas en Dio bazanta karito de frateca kunestado, bonege parolis s-ro Gerhard Schwarz, Wien kaj tiel kompletigis la parolojn de Prof. Hansemann.

Pri la „seriozludo“ de Dio en la kreado kaj en la ago de pardono parolis Prof. Dro Winfried Gruber, Graz. La sintezo de la seriozludo de la homo

en la historio nur estas ebla ĉar por Dio, la absoluta, persona estulo, ĉio „bone finiĝas”. Do por kristano nur restas la zorgo pri la homo, kiu ja kun la zorgo pri Dio estas nedisigeble ligata. Ĉu kristane kaj teologie neriproĉebla kompreno de la mondhistorio estas ebla, sen certeco de la graco por ĉiuj homoj? Pri ĉi tiu demando plej turmenta por la kristanoj, parolis D-ro Olaf Colerus-Geldern, Klagenfurt, en referato, en kiu ĉia provo de teologia definitivsolvo estis rifuzata, ĉar per ĝi estus nuligata la libereco de Dio kaj de la homo kaj per tio ankaŭ la esenco de la mondhistorio.


Arkitekto ing. Herbert Prader parolis pri la neimageblaj perspektivoj de la naturscienco, tekniko kaj arkitekturo, redaktoro K.H. Haysen, Wien raportis pri la moderna pentro-arto.

Univ. docento D-ro Friedrich Heer kaj nacia konsilisto D-ro Weiss parolis pri la kristana konfido en la historion kiel „ludanta” enkreskado en la konkretan esperon al la estonteco. Laŭ docento D-ro Heer la paco en la mondo nur povas kreski, se ĝi kreskas en ni mem, ĉiutage kaj ĉiuhore, paŝon post paŝo. La timo taŭgas por nenio. La radiko de ĉiu libereco estas la spirito. Sed devas esti al ni klare, ke certaj grandaj konfliktoj ne estas solveblaj, ekz. neniam povos ekesti fratiĝo inter la komunismo kaj katolikismo. Nia tasko estas rigardi en la kontraŭulo nian fraton. La historio de la homaro estas en la historio de la mondo nur mallonga interludo — ni staras en la grandaj epokoj de la mondhistorio nur je la komenco.

La viglaj debatoj post la referatoj rezultigis multajn fruktodonajn ideojn. La studsemajno en Tanzenberg estis alloga pro multaj kulturaj aranĝoj. Ĝi finiĝis per la jam tradicia vizito de D-ro Josef Köstner, episkopo de Gurk-Klagenfurt.

K. D.

Tanzenberg estis unue kastelo, ŝariĝis poste abatejo de la Olivetanaĵ-Benediktanoj kaj estas nun dum preskaŭ dek jaroj episkopa seminario „Marianum”. Sur la bildo, tute maldekstre oni vidas la novkonstruitan gimnazion, kiu estas gvidata kiel filio de la gimnazio en Klagenfurt. La profesoroj estas ĉiutage transportataj per malgranda aŭtobuso al Tanzenberg kaj returne. En la preĝejo troviĝas la tombo de la granda episkopo de Gurk-Klagenfurt Josef Kahn, fondinto de „Marianum”, tiam en Klagenfurt kaj de la presejo Carinthia.





LA SANKTA NOKTO

traduko de la germana

„Stille Nacht, Heilige Nacht“

Paca nokt', sankta nokt';
 ĉio en dorm', sole nur
 ne la kara, sanktega par',
 ĉarma knabo kun bukla harar',
 dormu en paca kviet! -2x-

Paca nokt', sankta nokt';
 ĥoranĝelar' vekas nun
 paŝtistaron solene per kant';
 ĝoje gloras nun ĉiu aŭdant':
 Jen la Savanto, Jesu! -2x-

*La kapelo kie en 1818 unuafoje eksonis
 ĉi tiu kanto de pastro Josefo Mohr.*

Historio de kristnaska kanto

Ŝajnas al mi, ke multaj homoj ne konas la historion de la ĉisupra kristnaska kanto (Germane: „Stille Nacht, heilige Nacht“). Ĝia patrolando estas Tirolo, Aŭstrujo. La aŭtoro de la teksto estas la katolika pastro Josefo Mohr (1792-1878), la verkinto de la melodio estas la organisto Gruber.

Dum la antaŭvespero de Kristnasko de la jaro 1818 pastro J. Mohr, vikario de la vilaĝo Obendorf (Aŭstrujo) sidis en silento kaj kontemplado en sia ĉambro antaŭ kverklingna tablo. Li fervore legis kaj primeditis la Sanktan Skribon por prepari sin por la prediko dum la kristnaska noktmeso. La kontempladon pri la mistero de la Dia Homiĝo, tamen, malhelpis al li vilaĝanino. Ŝi venis por peti al la sacerdoto, ke li bonvole venu kaj benu infaneton, kiun hodiaŭ naskis la edzino de malriĉa ligno-hakisto, loĝanta en la plej alte situata domaro. La pastro eksentis strangan kortuŝon, kiam li transpaŝis la sojlon de la mizera, malforte lumigita kabano kaj ekvidis la junan patrinon. Ŝi kuŝis sur krude farita litaĉo, feliĉe ridetis kaj alpremadis al si la nove naskitan infaneton, kiu ĉiele dormis. Ĉi tiun kortuŝaĵon la pastro tuj komparis kun la fragmento el la Sankta Skribo, kiun li ĵus estis traleginta: „Naskiĝis al vi Savanto...“ Li reiris hejmen laŭ neĝkovritaj vojoj kaj edife meditis. Li eksentis tre feliĉigan emocion, rigardante de tempo al tempo la ĉiam malhelajn deklivojn. Nun, tamen, ili estis brilantaj pro la lumoj, kiujn portis la paroĥanoj ekirantaj al la noktmeso, dume el ĉiuj proksimaj kaj foraj vilaĝoj solene sonadis la sonorilmuziko. Post la noktmeso pastro Mohr denove eksidis en sia ĉambro antaŭ la kverklingna tablo. Kaŭze de ia vere mirakla inspiro li fiksis sur paperon tion, kio al li

okazis dum la kristnaska antaŭvespero. La vortoj naskiĝadis verse, kaj kiam mateniĝis la poezia verko estis preta. Tiun saman tagon la orgenisto Francisko Gruber, talenta amatoro sur la kampo de eklezia muziko kaj samtempe kant-instruisto en la vilaĝa lernejo, amiko de pastro Mohr, traleginta la verkon kaj ravita de ĝi, ekfariis melodion por ĝi. La nova kristnaska kanto, belsona kaj raviga, verŝajne ne disvastiĝus en la tiamaj cirkonstancoj de neperfekta komunikado, se la okazo ne ebenigus al ĝi la vojon al la famo. La difektitajn orgenojn en tiu regiono riparadis tiutempe la fama Majstro *Karlo Mauracher*. Kiam la laboro estis finita kaj iu orgeno riparita, li petis la orgeniston Gruber, ke li ĝin elprovu. Gruber ĉiam volonte plenumadis la deziron de Mauracher kaj ludadis diversajn ekleziajn kantojn. Fine li ekludis ankaŭ la melodion, kiun li dum la kristnaska tago komponis por pastro Mohr. „Tiun kanton mi ankoraŭ neniam aŭdis” — diris la ravita Mauracher — „ĉu estas al mi permesate ĝin kunpreni?” Mauracher kunportis la kanton en sian hejmon. Li ofte kantadis ĝin en sia preĝejo. Kaj la kredantoj baldaŭ ellernis ĝin. Ĝi fariĝis, do, en la ĉirkaŭaĵo amata popolkanto. La bonkora Mauracher ne antaŭsentis, ke diskonigante la kanton inter la popolo, li malfermis al ĝi la vojon tra la mondon. En 1882, dum la kristnaska festo, la unuan fojon en la reĝa kapelo de *Fleissenburg* kvar infanoj el tirola vilaĝo, post la solena diservo ekkantis „Paca Nokt’ Sankta Nokt’...”

La nova ĉarma kristnaska kanto kvazaŭ flugleviĝis kaj formigris en la malproksiman mondon por ĝeneraliĝi inter multaj kristanaj nacioj.

Laŭ „Gość Niedzielny” libere tradukis Jan Tomanek.

DECEMBRO

Plej kurtaj tagoj nebulomienaj
kaj longaj noktoj kun glaciaj steloj
sinsekvas senkonsolaj kaj senbenaj
en labirinta voj’ al foraj celoj — —

Sed sereniĝas nuba horizonto
kaj milde jam degelas frost’ en koro:
malsupreniras teren la Savonto
kun paca himno de l’anĝela ĥoro.

Lumturo de la homa historio
fariĝas krip’ en stalo Betlehema.
Al ĉiuj tempoj, landoj benas Dio,
l’Infan’ de l’Virgulin’ plej obeema.

Kaj kreskas tagoj, cedas nokt’ malluma,
invitas hejmen ĉiel-melodio.
L’esperon portas en tenebro duma
decembra kanto pri la glor’ al Dio.



Jan Filip.

ESPERANTO VIVAS

AŬSTRUJO. La tradicia *Viena Esperanto-tago* okazis ĉi-jare la 29an de oktobro kun enkonduka laborkonferenco kaj kongresraportoj pri la 46a U.K. kun antaŭkaj postkongresoj, TEJO-, SAT- kaj IFEF-kongresoj, Feriorestado en *Primošten - Jugoslavio*, ktp. Samtempe oni festis la oran jubileon de la Esp. Societo Danubio, la 50-jaran esperantistecon de kort. kons. *H. Steiner*, s-ro *Popper*, nun en Usono, kaj d-ro *A. Halbedl*, *Knittelfeld*. *

HISPANUJO. En la urbo *Valadolid* okazis 8.10.61 la solena inaŭguro de 3 Esperanto-kursoj. Ĉeestis la lernantoj de la antaŭa kurso, por honorsaluti sian instruiston, S-ron *Mariano Cantalapiedro Nieto*, kiu sindoneme kaj kun granda fervoro instruis al ili la internacian paclingvon Esperanto. Du ekskursanoj



oferis al li belan donacon kaj pergamenon plenan de subskriboj, kiel memorigaĵon. La instruisto emociita dankis pro tiu omaĝo per simpla kaj patra parolado. Sekve okazis la malfermo de la nova kurso en la blankverda aŭlo; la instruisto salutis la 79 ĉeestantajjn gelernantojn de la kastelana ĉefurbo. Tuj poste komenciĝis la unua leciono, kiun ĉiuj aŭskultis kun atento kaj scivolemo. Post la leciono ĉiuj foriris tre kontentaj.

En la sidejo de la Katolika Laborista Junularo (J.O.C.) komenciĝis kurso kun 15 lernantoj. La tria kurso okazas per *Radio Valadolid*, kiun disaŭdigas lunde, merkrede kaj vendrede dum 15 minutoj, tri el la lokaj grupanoj.

Vere, la internacia lingvo bone disvastiĝas en *Valadolid*! *

DANLANDO. Post bona preparo fare de speciala komisiono, s-ro *D-ro Ivo Lapenna* faris en septembro prelegon en diversaj porinstruistaj seminarioj; li parolis en Esperanto kaj oni parton post parto tradukis en la danan lingvon. Entute aŭskultis lin 2100 studentoj kaj 130 profesoroj. Poste li vizitis la Ministran de Edukado, s-ron *K. Helvig Petersen*. Rezulto: en la lerneja jaro 1961/62 Esperanto estas instruata kiel nedeviga fako en la 8a kaj 9a klasoj de ĉiuj lernejoj kaj ankaŭ en ĉiuj vesperlernejoj. Jen imitinda ekzemplo de bone preparita kaj bonege sukcesinta propagando! *

NI GRATULAS

Sac. Jan Filip, No. 57, Letohrad, Ĉeĥoslovakujo, kiu dum jardekoj estas membro de IKUE, en sia lando fervora propagandisto de Esperanto, kiun ĝis antaŭ 13 jaroj renkontis multaj samideanoj dum kongresoj kaj liaj prelegoj kaj kies poemoj ankaŭ nun de tempo al tempo aperas en nia revuo, esperas atingi 9.12.61 sian 50-an naskiĝtagon. Plej koran gratulon al nia tre kara samcelano kun la promeso de sincera preĝo, ankaŭ por lia malbona sanstato! *

La 30.10.61 naskiĝis *Philippus Cornelis Johannes*, filo de gesroj *Jacques kaj Vera Tuinder-Dekker* en Hago. Ni kore gratulas la antaŭan redaktoron de *Birdo*, nunan kunlaboranton de *Espero Katolika* kaj lian edzinon, kiu ankaŭ estas fervora esperantistino, pro tiu feliĉa okazintaĵo. Intertempe ili transloĝiĝis al alia adreso: *Boslaan 29, Balkbrug-Ov. Nederlando.* *

Same niajn korajn gratulojn al gesroj *D-ro Phil. Hermann Frings* kaj edzino *D-ro Med. Marie Theres Frings-Hirschmann*, *Kölnstr. 593 A, Bonn, Germanujo*, pro la naskiĝo je 31.10.61 de ilia filino *Marie Theres.* *

Ni gratulas al *prelata moŝto d-ro Karl Rudolf*, katedrala kapitulano, estro de la *Viena eĉepiskopa Oficejo* kaj *Instituto por animprizorgado*, de la *Katolika Filmkomisiono*, same de la Ĉefa Laborfako de la *Pax Christi-movado*, je lia 75a naskiĝ-tago. La senlace agema modele modesta eklezia eminentulo ofte montris sian favoran sintenon kaj akcelon al Esperanto kaj nia afero; li ankaŭ apartenis al la Honora Komitato de nia 27a IKUE-kongreso 1958 en *Vieno.* *
Plue niajn korajn gratulojn al la „*Esperanto-Societo Danubio*” kaj ĝia klubestro s-ano fin.-dir. *Raimund Cech* je ĝia 50-jara jubileo. S-ano *Cech* estas ankaŭ prezidanto de „*Aŭstria Esperantista Federacio*” kaj akcelanta membro de *AKLE-Wien.* *

Fine, sed ne laste, niajn plej korajn gratulojn al nia fervora membro kaj kunlaboranto, *d-ro Adolf Halbedl*, advokato, *Bahnstr. 45, Knittelfeld, Aŭstrujo* pro lia ora jubileo kiel esperantisto.

47-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO KOPENHAGO — 4-11 AŬGUSTO 1962

Sub la Alta Protektado de la Dana Ĉefministro Viggo Kampmann

OFICIALA KOMUNIKO No. 2

1.11.1961

Fervoja Rabato: 35% de la prezo de 2 unuvojaj biletoj, se oni aĉetas ir- kaj revenbileton, ricevebla ĉe ĉiuj stacidomoj kaj vojaĝoficejoj je monstro de la Kongresa Karto.

Infankongreseto: por geknaboj de 6-13 jaroj. Petu informojn kaj aliĝilojn ĉe U.E.A.

Adoptaj Gepatroj: helpas al nepagipovaj gepatroj. Kotizo: 30 ned. guld.

Glumarkoj: estas aĉetebraj ĉe U.E.A.: 1 guld. = 4 steloj por 30 pecoj.

Statistiko: ĝis fino de oktobro anoncis sin 178 partoprenontoj el 27 landoj.

FROSTAVALLEN

En 1962 la Universala Kongreso de Esperanto okazos en Kopenhago, kaj la Sveda Esperanto-Instituto decidis aranĝi prelegsemajnojn la 5-an fojon en *Frostavallen* tuj post la Kongreso 12-19 aŭgusto 1962.

Plurfoje la prelegsemajnoj en *Frostavallen* vekis grandan atenton inter la esperantistoj, kaj la diversnaciaj aŭtoritatuloj informiĝis pri la altvaloraj prelegoj, prefere pri la laborprogramo de UNESKO. La sveda UNESKO-Konsilantaro estis ĉiam inter la invititoj.

La programo ankoraŭ ne estas fiksita, sed ĝi konsistos kiel kutime el prelegoj de eminentaj spertuloj, diskutoj, vesperaj distraĵoj ktp.

Jam nun vi povas peti aliĝilon kaj informojn ĉe s-ro *Jan Strønne*, Amiralsgatan 36, *Malmö, Svedujo*, kaj li sendos ilin al vi, kiam la programo estos preta.

PAROLAS LA LEGANTO

„FORGESEMULOJ”

De revuo al revuo mi trovas viajn plendojn pri la forgesemuloj kaj pri la malĝentilaj ŝuldantoj. Mi supozas, ke vi certe tre ofte pripensas viajn spertojn, sed tamen bonvolu aŭskulti miajn rimarkojn. Mi ne povas kompreni, kial tiuj, kiuj ne plu havas intereson por nia afero — montrante tion per longedaura silentado kaj ne informante vin pri sia eksiĝa decido — tamen „daŭre” akceptas nian revuon. Probable vi esperas ke temas pri forgesemuloj, kiuj certe baldaŭ pagos, ne pri eksiĝintoj. Sed vi — kiel internacia unuiĝo — ne havas la kapablecon, devigi la eksiĝintojn, por ke ili pagu la ŝuldojn. Kaj nure morala devigo ankaŭ en katolikaj rondoj evidente ne plenigas la kason. Oni eĉ rajtas supozi, ke indulgemo provokas aŭ almenaŭ prosperigas senzorgemon kaj forgesemon rilate al monŝuldoj!!

Do kelkajn proponerojn: fiksi limdaton por la kotizpago je venonta jaro (eble la 1-an de decembro); membroj, kiuj ĝis la indikita limdato ne estas pagintaj la kotizon, ricevas nur la januaran eldonon de nia revuo kun admona stampilo sur la kuverto; neniu plua admona skribo; kaj la admona stampilo kaj la nericevo de la sekvontaj eldonoj de la revuo instigos la forgesemulojn, aŭ pagi la kotizon aŭ konstati sian malintereson per ĝentila sciigo al vi, eble ankaŭ nur per malĝentila plua silentado. Mia opinio pli klara stato rezultus per tia necese malmola procedado; eble ankaŭ — almenaŭ komence — pli granda fluktuo de la abonantaro. Sed vi ja estas submetita al speciala situacio.

Fervorege kaj sendube bonintence la aŭtoro de „Vekiĝu” argumentas kontraŭ la eksiĝinto. Sed li — laŭ mia opinio — tute malpravas absolutigante nian aferon, t.e. „helpilon”. Alie: la tagon, kiam la aksioma frazo „La eksiĝo estas tute ne, — neniokaze, — pardonebla!” estus fariĝinta ero de nia Statuto, mi tuj eksiĝus. La vivo ne estas tiel logika kiel laŭ „Vekiĝu” ŝajnas, la ĉiutagaj kaj tutvivaj taskoj ofte tro malsimplaj, la vojo al individua realigo de katolikeco tro unika — ke estus senkonsciencie ŝarĝi kaj fortimigi nekonatajn homojn de plej variaj individuaj kaj naciaj karakteroj per tiaj malpravaj pretendoj (kiuj ankaŭ certe ne malhelpos la malkreskadon de ni membraro). Cetere: ĉu li scias, kiom da unuiĝoj katolikaj estas benitaj ĝis la hodiaŭa tago de la Papoj? Ne do ĉiuj kune estas deviga vojo por esti vere katolika homo — sed eblecoj, bone uzeblaj vojoj, „helpilaj” por kreski en la amo al Dio kaj el la kunhomoj.

Hans Fechler, Zierenbergstr. 98a, Hildesheim, Germ.

KRISTNASKO-DEZIROJ 1961

Esperanto-instruo en ĉiuj klasoj de la popollernejoj: komence kvazaŭ lude en bildoj, kantoj kaj ludoj, en pli altaj klasoj gramatikaj kursoj. Jam nun ankaŭ en lernejoj Esperanto estu deviga fako. Ĉiuj katolikaj organizoj formu E.-misio-sekciojn. Esperantokursoj en ĉiuj katolikaj gazetoj kaj revuoj. Instigo al la praktikado de E. en ĉiuj rangoj de la internacia katolika Eklezio. Kursoj kaj paroladoj en la radio. Ĉiuj katolikaj samidenoj abonu la proprajn E.-revuojn. La junularo propagandu pere de leter-misio! Jen multaj taskoj, el kiuj ĉiu elektu tiun, kiu estas plej taŭga por li aŭ ŝi.

Anton Rupert Sittl, Breisacherstr. 18/III, München 8, Germ.



55. *Konfeso de... Sacerdoto.* S-ano *Gambutu Antonio, Santarcangelo, It.* sendis jenan travivaĵon: La lastan aŭguston mi renkontis du junajn katolikajn sacerdotojn unu el *Irako* kaj la alia ĉino el *Tientsin*. La ĉino rakontis i.a. la jenan sperton: vojaĝante en Germanujo li volis sin konfesi, sed ne trovis eĉ unu sacerdoton parolantan angle, france aŭ itale. Tial li decidis sin konfesi latine. La sacerdoto al kiu li demandis latine paliĝis kaj, ne povante refuti, nur kape jesis. Fine aŭskultinte la konfeson li nenion diris, sed preninte la rozarion montris fingre unu dekon kiel pentofaron. Eĉ ne unu vorton li kapablis paroli latine. — (Oni komparu i.a. *Vento..n.52*).

56. *Kion parolas la kuiristo kaj la kelnero?* — Pli ol 1000 eksterlandaj viroj kaj, precize dirite, 294 ekster-

landaj virinoj ĉi-tempe laboras en la nederlandaj *Horeka* (=hotelaj, restoraciaj, kafejaj)-metioj. Ne inkluzive la 377 ĉinoj, kiuj ĉie laboras en la manĝdometoj. Iu s-ro *Kunst*, kiu prizorgas la laborpermesojn en la metio deklaris al gazetisto de la *Volkskrant, Ned.* — 13-10-'61: Antaŭ la milito taŭga nederlanda kelnero, kiu volis koni siajn lingvojn iris ekzerci eksterlande. Post la milito el tiu neceso rezultis speco de interŝanĝa sistemo, precipe de francoj kaj svisoj el la hotela metio, kiuj siavice ankaŭ volas kompreni la nederlandan lingvon. Post ia informiĝo al mi montriĝis ke multaj restoracioj kaj hoteloj ne ŝatas enoficigi eksterlandanojn ĝuste pro tiuj lingvaj malfacilaĵoj. Iu granda hotelo ekz. en *Amsterdamo* havas tial nur 3 eksterlandajn ĉambristinojn en sia servo. Oni tie diras: Ni ne bone scias kie ni devas loki eksterlandanojn. Ili ne povas noti mendojn kaj en la kuirejo ili ne povas labori. Tra du laŭtparoliloj tie la manĝaĵoj estas mendataj. Se staras italiano ĉe la forno tiam alia kuiristo unue devas traduki kaj instrui lin, kiel li devas prepari la manĝaĵon. Tio kostas tro da tempo. Ni povas uzi la ĉambristinojn ĉar ili apenaŭ havas rilaton kun la gastoj; sed cetere ni havas stabon nederlandan.

57. *Refoje: kostoj de interpretistoj.* El: *Esperanto-Oikoumene*, julio 1961: En „*Espero Katolika*” p.121 (jes: n.42 de *Vento..C.A.O.*) ni legas, ke en Bruselo interpretisto kostas tage 60.50 dolarojn aŭ 263 DM. Antaŭ ses jaroj oni pagis en Nederlando 175 guldenojn aŭ 195 DM po interpretisto kaj tago. Por konferenco en kvar lingvoj oni bezonas tri garniturojn da kvarlingvaj interpretistoj aŭ da ok trilingvaj. Krome estas pagotaj: lu-prezo por la parol- kaj aŭskultaparatoj, kompensoj por mekanistoj, tradukistoj kaj stenotajpistinoj de la publikigaĵoj en la dua ĝis kvara lingvoj, preskostoj, vojaĝ- kaj transportkostoj. Mi taksas, ke oni atingas la sumon de 100.000 DM je kostoj en la tria semajno de kvarlingva konferenco, kion oni povus ŝpari per uzo de nur unu lingvo.

Dankante pro la alsendo mi petas: sendu viajn interesaĵojn nepre al:

paroĥestro C. A. Ouwendijk, Rijpwetering, Nederlando.

RABINDRANATH TAGORE EN ESPERANTO

Kolekto da rakontoj de la fama hinda verkisto kaj poeto *Rabindranath Tagore*, kies centjaran naskiĝ-datrevenon oni festis en majo 1961, estas eldonita en Esperanto de la Eldona Societo Esperanto en *Malmö, Svedujo*. La rakontoj estas rekte tradukitaj en Esperanton el la originaloj en la bengala lingvo. La tradukinto estas *Lakshmiswar Sinha*.

Laŭ Unesco-Features kaj UEA-Infoŝerbo

NI RECENZAS

INFANOJ NE KONAS LIMOJN. La granda nederlanda eldonejo BRUNA en serio de „poŝlibroj” eldonos ĉi tiun libron, aperontan en decembro. Ĝi enhavas 111 fotojn pri infanoj de kvin kontinentoj kaj ĉ. 50 paĝojn da teksto. Prezo: 2,95 ned.guld. = 11,80 st. + afranko. Mendu jam nun ĉe nia libro-servo. Recenzo sekvos post apero. *

MODERNA MARTIRO. Verkis: A. Buckinx-Lyckx; esperantigis Frato Leotado de Ruyver. Eld. Fratoj de l'Karitato, Inst. S. Kamilo, Bierbeek, Belgujo. 21 x 13 cm 64 p. broŝ. ilustr. Prezo: 25 bfr. = 2 gld. = 8 steloj, + afranko, ĉe nia L.S. — Ilustrita biografio pri la pola Patro Maksimiliano Kolbe, la „kavaliro de la Senmakula”, kiu kiel martiro de la karito libervole suferis la malsatmorton en nazista koncentrejo, por savi la vivon de familia patro. En E.K. ni jam kelkfoje rakontis pri Patro Kolbe, lastfoje en artikolo „La Sacerdoto kaj la Viktimo” (1960, 7). Li ne nur estis heroo pro sia morto, sed lia tuta vivo estis modela, ĉiama klopodo por disvastigi la Regnon de Dio, ne nur en lia patrujo, sed malproksime ekster la landlimoj. La 15an de marto 1960 komenciĝis la proceso por la beatproklamo de patro Maksimiliano Kolbe, ĉe la Kongregacio de Ritoj en Romo. Estis bonega ideo de la Fratoj de l'Karitato, jam famaj pro la praktika uzo de Esperanto por sia apostolato, eldoni tradukon de la interesa verko en formo de plaĉaspekta, ilustrita libro. Lingvo kaj stilo estas bonegaj: gratulon al la tradukinto! *

LONDONO, la monda metropolo. Rapida vizito al la ĉefaj vidindaĵoj de Centra Londono. Verkis: Edward Ockey. Riĉe ilustr. 4 paĝa broŝuro 30 x 24 cm. — Post historia resumo sekvas priskribo en bona Esperanto de la diversaj urb-kvartaloj. Ricevebla kontraŭ unu stelo aŭ resp. kup. aŭ ses pencoj ĉe s-ro Edward Ockey, 15 Upper Pines, Banstead, Surrey, Anglujo. *

OKCIDENTGERMANA REVUO. Eldonejo kaj presejo: Limburger Vereinsdruckerei GmbH. (16) Limburg-Lahn, Germanujo. Redaktoro: Jos. F. Berger. — Dumonata revuo, 8 pĝ. 30 x 21 cm, ilustrita, kun interesaj art koloj pri urboj, politikaj personoj, industrio, agrikulturo, komerco, folkloro ktp. ktp. en bonega Esperanto. Prezo ne menciita, verŝajne senpaga. Petu specimemon! *

SALZBURG, LA URBO DE LA MUZIKO. La urbo Salzburg, kie staris la lulilo de Mozart, eldonis luksan, riĉe ilustritan broŝuron kun priskribo en Esperanto de la vidindaĵoj kaj de la famkonataj Salzburgaj Muzikfestivaloj. Petu senpagan ekzempleron ĉe: *Urba Trafikoficejo, Salzburg, Aŭstrujo.* *

APRENDA ESPERANTO SIN MAESTRO! — GRAMATICA DEL ESPERANTO. Du poŝlibretoj (proks. 11 x 8 cm kaj enhavantaj po 80 pĝ.) aperis kiel n-roj 520 kaj 521 de la serio „La praktika helpanto” de la eldonejo „Cosmopolita”, Buenos Aires, Argentino. No. 520 enhavas la regulojn por la prononco kaj simplastilajn konversaciojn pri ĉiutaĝaj temoj en hispana lingvo kaj Esperanto. No. 521 enhavas la gramatikon kaj koncizan historion de Esperanto. Vere tre praktikaj libretoj por hispanlingvanoj. Prezo: por Argentino po 15 pesoj; por aliaj landoj: por 10 ĝis 100 ekz. po 0,20 USDol., pli ol 100 ekz. po 0,18 USDol. *Korespondon adresu al:* Alberto F. J. Otamendi, N.E. Videla 168, Quilmes, Argentino. *Mendojn al:* Cosmopolita S.R.L., Corrientes 424, Buenos Aires.

SUB LA JUGO, Ivan Vazov. Tradukis eminentaj esperantistoj sub redaktado de *Simeon kaj Asen Simeonov.* Eldonis *Bulgara Esperanto-Asocio.* 464 pĝ. 20,5 x 15,5 cm en tuttola bindo kun oraj surprisoj. Prezo 10 ned.guld. = 40 steloj + 10% sendkostoj. — Belega romano en tri partoj el la vivo de la bulgaroj en la antaŭjaro de ilia liberiĝo el la turka juĝo. *Ivan Vazov,* kiu vivis de 1850-1921, estas unu el la plej grandaj bulgaraj verkistoj. Li mem partoprenis en la tiama rezistmovado kontraŭ la turkoj, sub kies jugo la bulgara popolo ĝemis de 1396-1878. Majstre li priskribas la angoron, la turmentojn de la popolo kaj precipe de la herooj en sia romano. Legante pri la granda danĝero en kiu estas la persekutataj rezistbatalantoj, ni retenas la spiron kaj preskaŭ sentas ilian angoron. Precipe personoj, kiuj antaŭ ĉ. 20 jaroj vivis en la samaj cirkonstancoj, bonege komprenas la situon kaj ofte rekonas bildojn el sia propra sperto. La traduko estas bonega kaj ni varme rekomendas ĉi tiun juvelon de nia Esperanto-literaturo, kiun ĉiu vera esperantisto devas legi kaj se eble, posedi. Mendu ĝin ĉe nia Libro-Servo, por vi mem, por via kursgvidanto aŭ via amiko: estas vere bonega donaco por la monato decembro, kiu ne nur estas monato de la festoj kaj donacoj ĝenerale, sed ankaŭ la monato de D-ro. Zamenhof, je kies honoro ni festas la tagon de la Esperanto-literaturo.

Truus Durenkamp.

ESPERANTOLOGIO, vol. II, kajero 2, julio 1961, p. 73-168. Redaktata de *D-ro Paŭlo Neergaard Ak., Kopenhago, Danlando.*

La unua kajero de ĉi tiu volumo de Esperantologio jam aperis en novembro 1959. Pro la grava enhavo la nuna kajero certe meritas apartan mencion.

Kolomano Kalocsay poeme, *Paŭlo Neergaard* kaj *Edmondo Privat* proze memorigas la vivon ĝisnunan kaj la verkaron de *Gastono Waringhien* sesdekjara., la meritgranda esperantologo kaj leksikografo.

Vilhelmo Auld indikas la neoficialajn vortojn en la poezio de *Hohlov* kaj *Mihalski.* *Andreo Albault* verkas pri: Etimologio, Pra-esperanto kaj Mistrala Lingvo; kaj *W.E. Collinson* pri kelkaj kulturvortoj. *D. B. Gregor* pritraktas la funkcion de la derivita adverbo en Esperanto. Artikolo de *H. A. de Hoog* temas pri interplektitaj frazoj. Pri la ata-ita problemo *K. Kalocsay* verkas, klarigante la waringhienan verbodividon.

N. Kawasaki el Osaka, Japanujo, donas kontribuon pri: Konsonantkombinoj ĉe radikkomenco. Ree *P. Neergaard* verkas: Demokrateco ĉe vortelektado kaj vortderivado en lingvo internacia.

W. Manders el Nederlando, kritikante *E. Drezen,* donas studon pri: „Latino macaronico”. *Kenji Ossaka* pristudas la gramatikan karakteron de la sufiksoj „in” kaj „um”. *J. Régulo Pérez* tuŝas la landnoman problemon: Ĉu Nepalo aŭ Nepalujo?

Ebbe Vilborg donas artikolon pri la esperantigo de grekaj nomoj. *Vilho Setälä* pritraktas la artikolon, precipe en Esperanto; kaj fine *J. C. Wells B.A.* de la universitato de *Kembriĝo en Anglujo* verkas pri: Indikoj per Esperanto de angla prononco.

Ni volonte atentigas pri ĉiuj artikoloj, ĉar ili montras la variecon de la enhavo kaj la internaciecon de la kunlaborintoj. Je la fino de ĉiu artikolo sekvas resumo nacilingva. Ke la nivelo estas science altkvalita, ni ne rimarkigu speciale, ĉar tio estas karakteriza pri „Esperantologio”!

H. G. Wannemakers S.J.

ENIGMO

Jen du serioj da vortoj. La vortoj de la unua serio staras en bona rangordo, sed ne tiuj de la dua serio.

Aldonu al la vortoj de la unua serio literon, tiel ke ili povas formi novan vorton kun la vortoj de la dua serio.

La aldonitaj literoj formas bondeziron al ĉiuj legantoj de E.K.



I.	II.
par	tubo
art	ĉelo
tur	ano
band	stalo
cirko	vidi
ĉap	uzi
kas	oni
karn	tri
jur	amo
li	kolo
pano	rolo
leg	tro
per	aŭ
fon	preni
kame	reto
mini	vadi
kre	timi
pres	alo
kon	valo
pied	oro
flu	pò
por	turo
part	ino
violo	stanco

Li de Jong-Roobeek



Demando kaj respondo.

Nova gasto pene klopodas komenci interparoladon kun la gastigantino.

„Kaj kion tiu belega urnsimila vazo enhavas,” li demandas al ŝi.

„La cindron de mia edzo.”

„Ho pardonu min,” balbutas la gasto.

„Ne ne, sinjoro, mia edzo estas ne mortinta. Li nur estas tro malagema por preni cindrujon, kiam li fumas.

Novbakita soldato vagadas tra la garnizonurbeto, renkontas kapitanon, sed ne salutas. La oficiro venas al li kaj ekbojas:

— Ĉu vi ne povas saluti min?

— Sed mi tute ne konas vin — naive respondas la knabo.

— Kaj ĉu vi ne scias kion signifas tiuj tri steloj sur mia kolumo?

La soldateto mirigite rigardas lin, kaj subite heliĝas lia vizaĝo:

— Ha, jes, sinjoro, altkvalitan konjakon!



D-ro R. Fiol, Calle A, „Villa Sunta”, Sector Sur, Sevilla, Hispanujo, deziras interŝanĝi fotojn, poŝtkartojn, gravuraĵojn aŭ iajn bildojn prezentante *imagojn de nia Sinjorino la Virgulino Maria*, de ĉiuj landoj. Li interŝanĝos aŭ rekompencos laŭvole per poŝtmarkoj, poŝtkartoj ktp. *

Faldbroŝuro pri Malmö. La ĝisnuna faldbroŝuro pri *Malmö*, Svedujo, en Esperanto, elĉerpiĝis, kaj novan eldonon pretiĝis *Malmö Turisttrafikförening, Malmö Svedujo*. La nova broŝuro estas nuntempe *senkoste* havebla, se vi skribos rekte al la nomita asocio (skribu en Esp. kaj nepre menciu vian deziron pri broŝuro en Esperanto)

40 anoj de Esperanto-rondo en porsacerdota seminario volas korespondi pri religiaj, katolikaj, junularaj problemoj kaj esperanto-movado. Adreso: *Patro Sigismundo Babiuch, Plac Katedralny 14, Wroclaw, Pollando.* *

Ni petas niajn geamikojn, noti nian novan adreson: *Jacques kaj Vera Tuinder-Dekker, Boslaan 29, Balkbrug-Ov. Nederlando.*

La Internacia Katolika Inĵormejo donas senpage informojn al nekatolikoj kaj sendas al ili sian dumonatan revuon „Vojo Vero, Vivo”. La katolikoj bonvolu subteni tiun belan apostolaton per mondonacoj kaj/aŭ abono je V.V.V. kies abonprezo estas 2,50 ned. guld. = 10 steloj jare. Nederlandanoj pagu al la sekretario de I.K.I. Gasthuisstr. 68, TILBURG, poŝtkonto 268507. Por eksterlandanoj la adreso estas: Sac. H. Roosen S.C.J., redaktoro VVV, Huize „St. Gerlach”, HEER (L), Nederlando, poŝtkonto 1036120. Ĉiam indiku por kiu celo via pago estas destinita. La landaj perantoj de I.K.I. kaj eventuale la reprezentantoj de IKUE/E.K. volonte akceptos pagojn.

I.F.S. en Romans

La grupo „Bona Stelo” 31, rue Pêcherie Romans Drôme FRANCUJO organizos de la 20-a ĝis la 27-a de Julio 1962 Internacian Ferio-Semajnon laŭ plej favoraj prezondiĉoj, en tutamikeca atmosfero. Ĝi entenos multajn ekskursojn tra la mirinde bela regiono. Petu rapide informojn ĉar ni ne povos superi limigitan kvanton da aliĝoj.

Jarlibro 1961

Listo subtenantaj membroj 1961:

S-ro Clement Hickey, Annandale NSW, Aŭstralio.

Listo de la Sacerdotoj:

Anglujo: Patro Th. Rudnick, Abbots Langley, Briackspear College, Watford-Herts., kiu antaŭe loĝis en *Passau, Germanujo.*

Italujo: Patro Silvestro Ollano, Piazza S. Pietro, Sassari.

Aferoj por la jarlibro 1962 devas esti ĉe la Redakcio antaŭ Krisnasko 1961!



RADIO VARSOVIO elsendas ĉiutage de 16.30 - 17.00 M.E.T. duonhoran programon en Esperanto sur mallongaj ondoj: 31,01 - 31,45 - 31,50 - 41,12 - 41,99 - 42,11 - 48,43 m. kaj sur meza ondo 249 m. (resp. 9675 - 9540 - 9525 - 7295 - 7145 - 7125 - 6195 - 1205 kc/s.)

Premioj estas lotumitaj inter la aŭskultantoj. Petu demandaron al: *Pola Radio, Esperantaj Disaŭdigoj, Varsovio, Pollando*, kiu tre interesiĝas pri la aŭdebleco en diversaj landoj.

RADIO ROMA Esperanto-Fako, Casella postale 320, Roma (Italujo).

La dissendoj okazas de h. 18.55 ĝis h. 19.10 (M.E.T.).

Ondlongoj: metroj 30.90 = Mc/s. 9.71; 41.24 = Mc/s 7.27; 50.34 = Mc/s 5.96,

Prelegantoj: marde: alterne S-ro L. MINNAJA kaj Prof. D-ro V. MUSELLA;

merkrede: S-ro Luigi MINNAJA; vendrede: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA.

DECEMBRO 1961

1: Grandaj italaj pentristoj: Andrea Mantegna; 5: Novaĵoj el Italujo; 6: Kuriero de Esperanto; 8: La Senpeka Koncipitino kaj la Anunĉiacio; 12: Tra la literaturo; 13: Kuriero de Esperanto; 15: Artefariteco kaj naturo en la lingvoj; 19: Leterkesto kaj bibliografio; 20: Kuriero de Esperanto; 22: Lokoj de S.ta Francisko: Greccio; 26: Italaj kanzonoj en Esperanto; 27: Kuriero de Esperanto; 29: Italujo kaj fremdaj verkiĝoj: Madame de Staël.

RADIO BERN, SVISUJO. Lunde kaj merkrede de 13.20 - 13.30 h., jaŭde kaj sabate de 22.15 - 22.30 h. MET, per la ondoj 31.46 kaj 48.66 m. (9535 kaj 6165 kc/s). Lunde kaj jaŭde parolas d-ro Arthur Baur, merkrede kaj sabate prof. d-ro Edmund Privat.

Aŭskultu la programojn en Esperanto kaj regule skribu al la koncernaj stacioj por danki kaj kuraĝigi al plujaj elsendoj.

RADIO WIEN, programoj II kaj III dissendas ĉiumarde *Informojn pri Aŭstrujo*, ankaŭ koncerne religiajn okazintaĵojn, en Esperanto.

SOLVO DE LA KRUCVORTENIGMO SUR PAĜO 205.

Horizontale:

A. provinc; imiti. B. rideg; ekran. C. oponi; drast. D. tort; aresto. E. ŝlos; si. F. krampo kvast. G. tapir; avert. H. Danubo; revi. I. ricev; blek. J. pot; ironi; rot. K. op. L. novel; kavalir. M. troti; amatoro. N. atlet; sanig. O. nutros; segilo. P. en; mol; kaj.

Vertikale:

I. protekt, spontane. II. ripo, rad, oportun. III. odor, apart, volt. IV. vent, mini, vetero. V. igi, ŝpruci, lito. VI. alo, ber. VII. cedro, ovo, kas. VIII. kresk, amaso. IX. iras, varbi, vanel. X. mast, avel, satig. XI. into, sever, logik. XII. striko, ir, la. XIII. izoli, rozoj.

Li de Jong-Roobeek

